# La Brita Esperantisto

Numero 989
Aŭtuno 2020




# ĜENTLEMANO


# Somerekrano

Vilĉjo Walker

ESPERANTO-KUNSIDO PER LA RETO ne estas nova afero: eĉ en 2007 la tiama bulteno *EAB NetNews* reklamis 'studsesiojn per Skype' kun **Roy Simmons**. Sed, pro la kronvirusa pandemio, 2020 estis rekorda jaro por 'virtualaj' Esperanto-kunvenoj, kursoj, konferencoj, kaj eĉ monda kongreso.



Nu, traekrana evento eble ne estas tiel vigla aŭ atentokapta kiel ĉeesta kunveno, sed estas facile partopreni, almenaŭ por homo kun bona interreta servo, ĉar oni ŝparas vojaĝo-koston kaj tempon. Pro tio, lastatempe aperis nova fenomeno de 'ret-kolibroj': esperantistoj, kiuj flugetas de kunsido al kunsido trans la mondo, kvazaŭ kolekti internaciajn poŝtmarkojn.



Ekde 1960 okazas somera kursaro en aŭ apud Barlastono, kaj EAB ne volis rompi la serion, precipe en la jaro de la 60-a datreveno! Do, kiam necesis pro trudizoliĝo nuligi la planitan *Somerlernejon* ĉe Esperanto-Domo, EAB aranĝis samnoman alternativan studsesion, ĉi-foje virtualan kaj celantan progresintojn, sub la gvidado de **Ed Robertson**. Aliĝo estis senpaga, sed kun kapo-limo por ke ĉiu ĉeestanto havu la eblecon partopreni plene. Por eviti ke prenu ĉiujn lokojn ret-kolibroj, komence nur esperantistoj loĝantaj en Britio rajtis aliĝi.

Tial, dum aŭgusta sabato, ok esperantistoj uzis la retkunvenan programon *Zoom* por 'renkontiĝi' kun Ed kaj partopreni *Somerlernejon*. Bonŝance, krom mikrofonoj, ni ĉiuj havis ankaŭ kameraojn, do anstataŭ senkorpaj voĉoj el la etero, ni estis grupo kun naŭ individuaj vizaĝoj. Aŭ, pli precize dirite, 8½ vizaĝoj, ĉar pro la meblara aranĝo ĉe Ed, ofte videblis nur lia frunto kaj okuloj, kio memorigis min pri la grafitioj 'Chad' el la 1940-aj jaroj.

Komence, Ed petis ke ni prezentu nin, kaj sekve, dum li luktadis pri la teknologio por montri tekston per *Zoom*, ni plu babiladis inter ni. Tia prokrasto ne estis vera ĝeno, ĉar per tiu klaĉado ni interkonis nin pli bone. Fakte, mi scivolas ĉu Ed intence nur ŝajnis lukti, ĉar nia daŭra babilado kreis etoson pli amikan, neformalan, kaj partopreneman por la tuta tago. Jes, restis kelkaj homoj malpli parolemaj ol aliaj, sed tiu normalas ankaŭ en reala klasĉambro, ĉu ne? Dume, ni malkovris ke (ĉu aŭ ne kolibroj) pli ol duono el ni naskiĝis ekster Britio: tia internacia tono estas ĉiam bonvena ĉe

Esperanto-evento, kaj utilis poste dum la tago, kiam ni diskutis vortojn kun ne-anglaj devenoj, kaj sintenojn en ne-britaj landoj.

La horplano ampleksis tri sesiojn po-90-minutajn. Ed saĝe elektis malsamajn studmanierojn kaj temojn por ĉiu sesio, por ke la tago havu varion. Inter ĉiu sesio estis paŭzoj 90-minutaj: pli longaj ol kutimaj kafpaŭzoj, tamen taŭgaj por vere streĉi la dorson, movi la gambojn, kaj rigardi ion pli foran ol komputila ekrano!

• • •

En la unua sesio, ni tralegis kaj studis *Haĉjo kaj Grenjo*, tradukon de Kazimierz Bein, pli ofte konata kiel 'Kabe'. Tiu fabelrakonto, titolita *Joĉjo kaj Margenjo* en la traduko de Kabe, estas sufiĉe simpla, sed elekti tiun tradukanton ebligis klarigon pri la historio de Kabe en la Esperanto-movado, kaj uzado de verko el la fruaj jaroj donis la eblon esplori kelkajn arkaismojn, ekzemple 'kareco', nuntempe 'malsufiĉo' aŭ eventuale 'malabundo'. Kiel kutime en kurso por progresintoj, nia instruisto ne krokodilis, sed klarigis la signifon de vorto uzante aliajn Esperantajn vortojn. Dum li klarigis la vorton 'raboti', mi povis kuri al mia ilo-kesto por montri mian propran rabotilon tra la kamerao al la grupo: tia spontanea prezento 'montri-diri' ne eblus en tradicia klasĉambra kurso!



La dua sesio estis diskuto ene de la grupo, unue pri la 'Fermi-paradokso': pro la aĝo de la galaksio devus ekzisti eksterteraj civilizacioj ĉie ajn, sed ĝis nun neniu trovis spurojn de ili. Rezultiĝas do la paradokso: 'Kie estas la eksterteruloj?' Ed stiris la diskuton el astronomio al Esperantujo per la 'Duolingo-paradokso': laŭ raportoj, pli ol 700 000 aktive studas Esperanton per la kurso *Duolingo* – tial, 'kie estas la Duolinganoj?' Fakte en nia grupo troviĝis du, kiuj studis per tiu kurso, kaj al la diskuto ili aldonis siajn proprajn spertojn.

En la fina sesio, ni elangligis diversajn tekstojn; ĉiuj proponis esprimojn, kaj per tia kunlaboro ni atingis bonajn solvojn. Gradigitaj 'B2' kaj 'C1' laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro, la tekstoj ebligis gustumi la diversajn nivelojn en la KER-ekzamenoj.

• • •

Ĉu nia virtuala *Somerlernejo* sukcesis? Laŭ mi jes: krom unu, ĉiuj restis ĝis la fino de la lasta sesio, kaj ni studentoj dankis al Ed pro tre informriĉa kaj ĝuinda tago. Retaj kunvenoj ne povos tute anstataŭi ĉeestajn kursojn, sed ĉi tiu virtuala *Somerlernejo* ja montris la utilon de video-renkontiĝoj. Eble similaj eventoj estos utilaj aldonoj al la aliaj kursoj de EAB, eĉ en la jaroj post la pandemio. ■